



MALGRANDA

N:RO 4 **REVUO** 1947

5-a JARO

PREZO: 1:— Kr.

ENHAVO:

	Paĝo
PRI LA KRUELO De profesoro John Lundquist	1
INTER BLUA KAJ BLANKA MILOJ De Kohen-Cedek ...	6
PRATEMPAJ POSTVIVANTOJ EN NOV-ZELANDO de Brendon Clark	13
DEBATO	17
LA KANTO DE ISLANDO — KAJ DE SUOMI De Vilho Setälä	22
LA DIECO De Goethe	28
LITERATURO	29

Redaktoro — Eldonanto:

STELLAN ENGHOLM, LUDVIKA, SVEDUJO

MALGRANDA REVUO

aperas kvaronjare. Prezo 1 kr. (inkl. sendkoston). Jarabono 4 kr. Unuopa ekz. al eksterlando kontraŭ 3 rpk. — S. Engholm, Skolgatan 9, Ludvika, Svedujo. Poŝta ĝirokonto 26 80 23.

Perantoj

- Aŭstrio: Eldonejo "Tramondo", Neutorgasse 9, Wien I.
Belgujo: Flandra Esperanto-Instituto, P. van Humbeckstr. 3, Brusel W.
Britujo: Libroservo de IEL, Heronsgate, Rickmansworth (Herts).
Danujo: Dro P. Th. Justesen, Fannerup pr Kolind.
Finnlando: Eldono Vilho Setälä, Onmentie 23, Helsinko Kä.
Francujo: Unuiĝo Esperantista de Francujo, 34 rue de Chabrol, Paris X.
Italujo: Sro Leo Costantini, Banco di Roma, filiale, Milano.
Nederlando: Libroservo FLE, Roelantstr. 4, Amsterdam W.
Palestino: Sro J. Kohen-Cedek, P. O. B. 7015, Jerusalem.
Portugalujo: Sro Saldanha Carreira, Av. Grão Vasco, 33, r/c, Benfca-Lisboa.
Svisujo: Sro O. Walder, Eigenheim, Romanshorn.
Usono: Libroservo de American Esperantist, 114 W. 16 St. New York 11.

MALGRANDA REVUO

N:ro 4

5:a JARO

1947

Pri la kruelo

De profesoro JOHN LANDQUIST (Svedujo)

Kruela estas tiu, kiu faras malbonon al alia kaj je tio ĝojas pro la sufero de la alia. Kruelo do similas parte al malica ĝojo. Sed estas krome grava faktoro. Kruelulo ĝojas plej, se li mem kaŭzis la malbonon, dum maliceĝoja homo estas kontenta, ankaŭ se iu aŭ io alia kaŭzis la malfeliĉon.

La ĝenerala akademia psikologio ĝis nun ne okupis sin pri la kruelo. Sed la psikiatrio, kiu havas pli da okazoj por studi la noktajn flankojn de la homa vivo, atentis pri la kruelo — verdire ne en ĝia tuta amplekso sed en limigita sekspatologia interrilato. En la psikiatrio la kruelo trovis lokon kiel trajto en seksa perverso, nomata sadismo.

La aŭstria profesoro Krafft-Ebing difinis sadismon kiel malnormalan kunligon de du grandaj aktivaj afekcioj: kolero kaj amo. Tiuj similas unu la alian en tio, ke ili serĉas sian objekton, volas ekregi ĝin, kaj ambaŭ montras staton de ekzalto. La degenera trajto ĉe la sadisto konsistas en tio, ke li povas atingi seksan kontentiĝon nur per tiu ekzalto, kiun vekas la pli malpli kruda, foje monstra turmento al la objekto. Ke la sadismo estas esprimo de profunda degenero, tion Krafft-Ebing trovis pruvita de tio, ke tiuj kazoj, kiujn li konis, plejparte montris ankaŭ aliajn krude psikopatajn trajtojn. Li neis, ke la kruelo trovata en la historio ordinare rilatas al sadismo, sed li ne traktis pli detale tiun demandon.

Lastatempe oni tamen sub influo de psikanalizo identigis kruelon kun sadismo. Oni do opiniis, ke ĉiu kruelaĵo enhavas

ion sekse malnormalan. Al la enkonduko de la nova termino kontribuis verŝajne tio, ke oni trovis la epiteton kruela tro malforta por diversaj militotempaj malbonfarantoj kaj opiniis, ke la vorto sadisto estas pli esprimforta.

Mi tamen konsideras tiun esprimon neĝusta kaj malutila, ĉar la sekvo de ĝia uzo estus, ke oni ne trafus kaj ne povus kontraŭbatali la kruelon en ĝia efektiva interrilato. Tial oni devus formeti ĝin. La sadismo estas sufiĉe malofta malsano. Kruelo sen seksaj kromintencoj kontraŭe havas teruran disvastigon en tiu homa vivado, kiu estas konsiderata normala. La ordinara hejmloko kaj inspiron de la kruelo troviĝas ne en la sekseco, kiu plejparte vekas mildajn sentojn, sed en la potencinstinkto. La sekva estu dirata pri la diferenco inter ordinara kruelo kaj sadismo.

Sadisto ĝuas ne la suferojn en si mem de sia viktimo sed kiel rimedon por veki seksan senton. Sed malamplena, kruela homo ĝuas la suferojn en si mem de sia viktimo, sen seksa sento.

Sadisto atakas ne kiun ajn sed nur tiujn, kiuj estas objektoj por lia seksa intereso. Sekse malnormala vira sadisto, kiu turmentas virinojn, ne havas intereson por turmenti virojn. Sed la normala aŭ vulgara kruela homo havas plezuron turmentante kiun ajn, kiu estas objekto de lia malamo.

Sadismo troviĝas preskaŭ ekskluzive ĉe viroj kaj plejparte celas virinojn. La ataka trajto en la sekseco de viro ŝajne kaŭzas, ke tiu degenero pli facile trafas lin ol virinojn. Ĉe virinoj sadismo kontraŭe estas trege malofta. Krafft-Ebing, la plej eminenta specialisto, konas nur du certajn kazojn. Aliflanke kruelo kontraŭ rivaloj kaj malamikoj, unualoke de la sama sekso, estas bedaŭrinde sufiĉe disvastigita ĉe la virinoj.

Ĉu kruelo ekzistas kiel origina kvalito, kiel aparta instinkto? Mi timas, ke jes. Esprimo de tiu kredeble estas la kruelo, kiu spontanee povas aperi ĉe mezgrandaj infanoj. Ĝi aperas parte kiel bestoturmento, parte kiel kruelo, kiu dum la fervoro de la ludo subite direktas sin kontraŭ kamarado. Kruelo troviĝas ĉe ĉiuj popoloj, ĉe primitivaj same kiel ĉe civilizitaj. Laŭdire speciale la indianoj montris altgradan kruelon. Ĉe t. n. civilizitaj popoloj la tekniko disponigis novajn rimedojn por fari

kruelaĵojn, kiel atestas malnovaj kaj novaj torturiloj. La ankoraŭ ekzistantaj hispanaj virbovaj luktoj estas kun sia terura bestoturmento hontiga plezuro, kiu ne povas havi alian celon ol publikan kontentigon de la kruelinstinkto.

*

La konsistigaj partoj de la kruelo ŝajne estas tiu ekzalto, kiu povas vekigi, kiam oni sentas sin mem sekura kaj esceptita de la sufero, kiun oni rigardas, plue la kontentiĝo, kiun oni povas senti, kiam oni perceptas la suferon de alia estaĵo en ĝia kvalito de eventuala malamiko, kaj fine la potencoĝuo kiu troviĝas en tio, ke mi estas la supera kaj kaŭzas suferon al la malpli forta. La kruelo en ĝiaj du unuaj konsistigpartoj — la duobla ekzalto pro propra sekureco kaj pro ĝuo de suferoj de alia estaĵo — estas per la evoluo de la sentovivo mem malaprobata kiel maldeca, hontiga sento. La normala psika evoluo en paca kaj orda socio signifas, ke la simpatiaj sentoj venas al gvidaj pozicioj en gravaj punktoj. Dum la pacperiodo de la 19a jarcento ĝis 1914 la kruelo estis malaperanta aŭ faris sin nevidebla. Ĝia apero en neoftaj okazoj estis konsiderata kiel manko de evoluo. Ankoraŭ dum la unua mondmilito la decido havis grandan forton, kiel montriĝas je komparo kun la dua mondmilito.

Sed estas la tria momento en la krueloĝuo, la potencoĝuo, kiu reeltiris la kruelon el ĝia honta ombro kaj en nia tempo donis al ĝi antaŭe ne kredeblan disvastigon. Estas la grandaj potencoŝanĝoj kaj la potencplenumo en la revolucioj kaj militoj de la nuntempo, kiuj restarigis la kruelon. Al tio kontribuis, ke en pluraj revoluciaj doktrinoj oni mokis simpatiasentojn, mildecon, humanecon, kiel antikviĝintajn, kristanajn, dubajn virtojn. Oni proklamis indulgan klasbatalon, rasbatalon, batalon kontraŭ malamikaj popoloj, kaj malindulgo signifas en tiu rilato ĝuste liberigon al la kruelo. Krom la potencfilozofoj laŭdis la potencoĝuon, kaj en la diktaturlandoj oni adoris ĝin kiel la plej altan ĝuon de la vivo. Sed potencposedo ĉiam emas degeneri en kruelon. La potenco nome ĝuas, se haltigaj sentoj ne ekzistas, ĝuste la suferojn de la senprotektaj kiel la plej evidentan pruvon pri sia potenco.

Estas tentoj de du specoj, kiuj kondukas potenculon al kruelo. Tiuj de unu grupo estas envio, malamo, venĝemo ĉe antaŭe subpremitaj homoj aŭ ĉe homoj sole malpli kapablaj aŭ malfavoritaj de la naturo aŭ alic, kiuj per renverso atingas potencon. Iliaj antaŭe subpremitaj malamsentoj ricevas nun okazon venĝi al la antaŭaj superuloj. Tiel estas klarigeblaj la kruelaĵoj, kiujn en ĵus pasinta epoko plenumis subestroj en diktaturŝtata polico kaj militforto, en la propra lando kaj en okupitaj landoj. Al la sama karaktergrupo, ordinare en malpli kruda formo, oni povas kalkuli knabturmentajn instruistojn kaj tiranajn patrojn: kiam ili turmentas junulojn, la interna movforto estas propra interna malharmonio.

Sed la potenculojn renkontas ankaŭ alispeca tento al kruelo, kiu aperas ankaŭ tie, kie malamo kaj venĝemo ne komence troviĝis. Tiu tento konsistas el tio, ke al potenculo saĝnas permesata ĉio aŭ multe, kio ne estas permesata al la homo en ordinara situacio. La potenco montriĝas al tiu, kiu ekposedas altan oficon, precipe en ne demokrata lando, multe pli granda, ol oni supozis: povas ŝajni, ke ĝi ne havas limojn. La homo riskas perdi la ekvilibron en tia situacio. Imperiestra frenezo estas la nomo de tiu perdita ekvilibro. Viktor Rydberg* faris rilate al imperiestro Kaligula grandiozan pripenson. "Pro manko de kontraŭpremo", diras Rydberg, "lia volo ŝvitis sangon same kiel la homo korpo, kiam mankas aerpremo."

La psika ekvilibro de la homo dependas grandparte de tiu premo, kiun faras al li leĝoj, moroj kaj la kritiko de la ĉirkaŭaĵo. Se tiuj baroj falas, kiel okazas al diktatoro kaj liaj trabantoj, tiuj potencoposedantoj ofte ne kapablas konservi la moralan ekvilibron. La homo bezonas libron sed liberon, kiu estas limigita de leĝoj, kiuj difinas la rajtojn de aliaj homoj. La demokratioj, kiuj donas al ĉiuj certan liberon sed al neniu grandan potencon, estas tial el *psikologia* vidpunkto la decidite plej bona ŝtatformo por la homoj. Nenio estas por ŝtato kaj homoj pli benefika ol tiu kritiko, kiu en demokrata ŝtato trafas la relative potencajn homojn. La diktatoroj ŝvitas sangon pro manko de kontraŭpremo kiel diris Rydberg kun same

* Viktor Rydberg — granda sveda poeto kaj humanisto (1828—1895).

profeta kiel historia vero. La diktatoroj, *neniu esceptita*, estas en la moderna mondo la grandaj vojfarantoj por malmoraligo kaj tiurilate unualoke por kruelo.

Ni venis al la rezulto, ke kruelo en sia kunligo kun potencinstinkto estas grava afero en nia ekzisto. La kruelo estas la radike morale malbona. La kristanismo fiksas tiun fakton per sia krucosimbolo. La kruco fariĝis bildo de la csenda eco de tiu ĉi mondo. La krucumo ne celis unualoke fari la malamikon sendanĝera, kio estus povinta okazi same bone alimaniere, sed ke li estu turmentata ĝis morto. La potencadorantoj en nova kaj malnova tempoj konfirmis tiun koncepton de la kristanismo pri la eco de la mondo, kvankam kun mala pritakso: ili laŭdis la triumfon de la potenculoj kaj la suferojn de la malfortuloj kiel la dezirindan mondordon. Respekton kaj kunsenton ili mokis kiel interesojn de malgrandaj kaj malfortaj homoj. En la teatraĵo "Rabobesto" de Karl Ragnar Gierow** deklaras la potencadoranto tre karakterize:

Ĉar kiu liberiĝis de homaj cerbumaĵoj
pri justo kaj mildeco, virto kaj nobleco
kaj ĉio alia, kio haltigas vin, vi malgrandaj
mizeraj rampuletoj, tiu duobligis
sian propran forton, li estas venkinto
kun perforto ĉe la zono, kun la brusto kirasita
de nepenetrebla kruelo, kaj en la mano
malamo, kiu profunde hakas en la kraniojn.

Deziro al kruelo estas venena lago en la homa vivo, kaj ĝi altiĝas per alfluo de ĉiuj antipatiaj afekcioj, la nebarita potencdeziro, la teroro de la subpremanto, la malamo de la subpremitoj, la venĝemo de la ofenditoj. La kruelo estas bazita sur primitiva tendenco, sed ĝin nutras multaj aldonataj motivoj. El tio montriĝas ankaŭ la ebleco por kontraŭagi ĝin. Oni sukcese kontraŭbatalas ĝin per tia sanigo de la homa vivo, kiu malhelpas amasiĝon de antipatiaj sentoj.

Mi mencias kelkajn el tiuj metodoj. La bestoturmenton, kiu estas ekzerca lernejo de la kruelo, oni devas neniel toleri. La diktatoroj, kiuj estas la altlernejo de la kruelo, oni devas sen-

** Karl Ragnar Gierow — sveda verkisto nuntempa.

lace kontraŭbatali, ĉar ili alportas katastrofan malaltiĝon de kulturo kaj humaneco. Kiu ne rekonas la homvaloron de unuopulo, tiu ankaŭ ne havas intereson por forigi la suferojn de unuopulo. Ankaŭ ĉiuj reformoj, kiuj faciligas la sorton de subpremitoj, kunhelpas por malpliigi kruelon, ĉar ili malhelpas amasiĝon de la krueltendencoj de malamo kaj envio. Aldone venas kiel pozitivia kontribuo tiu kulturado de la simpatiaj sentoj, kiujn donas bonaj ekzemploj kaj instruoj de religiaj kaj moralaj ideoj.

Tiuj ideoj estas esprimo por la longa sperto de la homaro kaj por la tendencoj al protekto por la vivo, kiuj spontanee kreskas en la vivo mem. La volo al vivo tiel staras mem antaŭ elekto: inter la miopa deziro subpremi kaj triumfi, kiu kondukas al ĝenerala detruo, kaj la vastrigarda intereso, kiu respektas kaj volas protekti la kreskantan homvicon. La batalo inter tiuj du partioj de la vivo estas la efektiva mondbatalo. Estas grave por ĉiu kaj ĉiuj, ke ĉiu en tiu batalo prenas lokon sur la ĝusta flanko.

La svedan manuskripton tradukis S. Engholm.

Inter Blua kaj Blanka Niloj

De J. KOHEN-CEDEK (Jerusalem)

Kio efektive okazas en la lando de la piramidoj? Kial transiras la grandvezira ofico de unu paŝao al alia? Kial falas la ministraroj? Kial malpaciĝas la publiko, strikas la studentoj, demonstracias la popolamasoj, kaj kial okazas teroristaj agoj?

Sendependeco! — jen la devizo.

Sed ĉu Egiptujo ne estas sendependa? Ĉu la anglaj okupantoj ne proklamis ĝin memstara, jam 1922, surtroniginte Fuadon, la filon de la iam ekzilita kedivo Ismael-ibn-Ibrahim-paŝao?

La egiptaj patriotoj postulas forigon el la lando de la angla garnizono.

Sed ĉu la angloj ne promesis paŝe plenumi tion? Ĉu ilia militŝiparo ne forlasis la havenon de Aleksandria — la plej gravan anglan bazon en Mediteranea oriento? Ĉu ili ne transdonis al la eta, unudivizia egipta armeo la faman kazernon kaj la citadelon, de kiu ili dum pli ol sesdek jaroj diktis sian volon al la tuta lando.

Pri kio do temas? Pri kio oni disputis dum la anglaegiptaj intertraktoj, pri kio oni diskutis dum la kunsidoj de UNO?

Temas pri Sudano, pri la vasta, nigra malantaŭlando de Egiptujo — al kiu ĝi apartenu, kiu ĝin estru kaj laŭ kiaj kondiĉoj.

*

La t. n. "anglaegipta" Sudano estas lando preskaŭ trifoje pli granda ol Egiptujo mem. Ĝi spacas 2.521.000 km², dum la tereno de Egiptujo havas nur 993.300 km². Rilate al loĝantoj Egiptujo trifoje superas Sudanon: Egiptujo nombras 15,6 milionojn da loĝantoj, Sudano nur 5,8 milionojn.

La sudanoj estas rase negra popolo, fremda al egiptoj ankaŭ lingve, kvankam la araba servas al ili kiel lingvo de kleruloj. Religie ili same kiel la egiptoj estas islamanoj. — Kial Egiptujo postulas tiun landon? Aliflanke: Kial la angloj rifuzas cedi al la egiptaj pretendoj pri Sudano? Kial ambaŭ flankoj tiel pasie aspiras *sola* superregi en tiu duonsovaĝa mondangulo?

2.

La egiptaj pretendoj pri Sudano apogiĝas sur la iamaj militaj konkeroj.

Kiam la makedona tabakvendisto, la albano Muĥamad-Ali (1769—1849), kiel turka oficiro estis sendita al Egiptujo por tie haltigi la napoleonan venkmarŝon, li tiel sukcesis, ke lia impericstro kaj kalifo de ĉiuj ĝustaj kredantoj faris lin paŝao. La titolo ne kontentigis la bravan aventuriston, kaj li decidis liberigi sin de la mameluka superregado. Li invitis en sian palacon al solena festeno tricent mamelukajn oficirojn. Kaptinte ilin li ordonis, ke oni mortigu ilin ĉiujn (1811). La sultano estis trookupita pri la vahabida danĝero, kiu minacis lian imperion. Muĥamad Ali promesis subtenon kontraŭ deca rekompenco: la kediva egipta krono. Ricevinte ĝin la ncsatigebla

Muĥamad-Ali al militis Sudanon, Palestinon kaj Sirion. Li jam intencis marŝi al Stambulo por detronigi sian kalifon kaj lin anstataŭi. Sed la angloj, interesitaj pri daŭra ekzisto de la "malsana homo" (kiel oni tiam nomis la disfalinantan turkan imperion), sendis sian militŝiparon al la haveno de Akra (1834). Ibrahim-paŝao, la adoptito de Muĥamad-Ali, devis fortiri sian armeon el Sirio kaj Palestino. Rekompence la eŭropaj ŝtatoj aprobis la egiptan memstarecon sub la scepro de Muĥamad-Ali, kedivo de Egiptujo kaj reganto de Sudano.

Jen la bazo por la egipta pretendo pri Sudano.

Sed la angloj rezone rebatas:

La posta maltaŭga regado de Ismael-paŝao, filo de Ibrahim, kedivo de Egiptujo 1863—1879, tiom ruinigis la landfinancojn, ke tio endanĝerigis la anglafrancajn moninvestojn en Egiptujo, precipe tiujn de la Sueza kanalo (1869). La staton ne savis eĉ la vendo al Anglujo de la kedivaj kanalaĵoj. Pro ŝtatbankroto la egiptaj financoj estis transdonataj al internacia komitato, kiu administru ilin (1880). La egipta popolo, ekribelinta kontraŭ sia kedivo, detronigis kaj ekzilis lin (kiu provokis la ribelon, tion la diskretemaj angloj ne rakontas!). Tiel venis Egiptujo 1882 sub fakte anglan okupadon, kun nur formala supereco de la turka sultano (ĝis 1914).

Guste tiam aperis en Sudano Muĥamad-Aĥmed ben-Abd-Allah. Ankoraŭ en 1875 tiu mistikulo proklamis sin "Mahdio", t. e. Die gvidata, sanktspirita profeto. Li instigis la fanatikajn sudanajn islamsektanojn al kontraŭegipta ribelo (1883). Forpelinte la anglan garnizonon li tute liberigis la landon de fremda jugo. Nur en 1896 lordo Kitchener sukcesis denove konkeri Sudanon, subigante la t. n. "ribelon de la derviŝoj". Pro sudanaj kotonkampoj militfalis multaj anglaj soldatoj. Tial — argumentas la angla vidpunkto — Anglujo rajtas pretendi pri sia parto en la landa regado. Sudano devas esti komuna angla-egipta posedo.

3.

Estas memkompreneble, ke tiu disputo, bazita sur batalhistoriaj argumentoj, estas nura "belliteraturo". Ĝi taŭgas pli

por salonaj konversacioj ol por realaj konsideroj, kiel varo konvena por eksporto sed ne por hejma uzo.

La veraj kaŭzoj, pro kiuj Anglujo ne povas cedi Sudanon, troviĝas en ĝiaj ekonomipolitikaj interesoj.

Sudano estas riĉega rezervujo de multaj mondneccesaj varoj: de t. n. "gummi arabicum" (araba gumo), de multekosta ĉuro, de oro, de agrikulturaj produktoj kaj de altkvalita kotono. Ĝia eksporto al Anglujo en la lastaj antaŭmilitaj jaroj (kun ekspluataj laborpagoj al la indiĝenoj) atingis jare la sumon de 8 milionoj da funtoj sterlingaj. La angloj disvolvis tie riĉegan kotonproduktadon. Sen sudana kotono (post kiam la hinda parte perdiĝos por Anglujo kun la liberigo de Hindujo) la manĉestera industrio devos stagni. Sudano, apartenonta sole al Egiptujo, signifus por Grandbritujo gravan prezplialtiĝon de ĝia kotono kaj katastrofan nevendeblon de ĝiaj kotonaj fabrikaĵoj.

La sukcesa kulturado de kotono en Sudano postulis artefaritan akvumadon. Tiucele servas la akvoriĉaj torentoj de Blanka kaj Blua Niloj, kiuj kunfluigante ĉe la Sudana ĉefurbo Kartum kreas la riveron Nilo, kiu trafluas tutan Egiptujon laŭlonge kaj akvumante tiun sekan landon servas kiel ĝia vera vivarterio. Guste ĉe la kartuma riverkunflucjo konstruis la angloj grandiozajn akvocisternojn kaj kolosajn digojn, kiuj ebligas sisteman akvumadon de la kotonkampoj kaj, kio estas pli grava, reguligas la akvofluadon kaj la sezonajn superakviĝojn de Nilo en Egiptujo. Grandaj anglaj monsumoj estas investitaj en tiujn entreprenojn. Kial la angloj senprofite cedu al Egiptujo tiujn laborojn, investojn kaj enspezeblojn?

Plue — ĉiuj scias pri la ekonomia, politika kaj strategia graveco por Anglujo de la Sueza kanalo. Sed nun, kiam Anglujo devas laŭ sia interkonsento kun Egiptujo fortiri de la lando sian armeon, ĝi tamen rajtas lasi sian garnizonon por gardi la kanalon. Tiu centjarvalida kanalkoncesio finiĝos en 1956, kaj de tiam ĝia sola posedanto fariĝos Egiptujo. Tiam ĉiuj intermaraj vojoj de la Grandbrita mondimperio dependos de egipta bonvolo. La Grandbrita potenco ne povas toleri tian verŝajnon. Tial ĝi nepre bezonas garantiĝon teni Egiptujon en sia pugno. Tion ebligas la akvobaraĵoj apud Kartum. Per

ili Anglujo povas ĉiam minaci la tutan Nilvalon per dezertigo — per haltigo de la akvo — kaj tiamaniere teni Egiptujon en ĉiama premado sur ĝia gorgo.

Guste tial okseitiĝas la egiptoj. Ne estas agrabla stato, kiam la sola viveblo dependas de najbara kaprico, ne estas plezuro vivi, dum super la kapo pendas konstanta damokla glavo. Ili bone scias, ke sen Sudano la egipta suvereneco estas nur sapa veziko. Guste tial ili tiel entuziasme deklamas pri "samspeca unueco de la tuta Nilvalo, de Etiopaj montoj ĝis Mediteranea bordo". Tio estas sensenca deklamado, troemfaza, sencnhava, historicipla frazaro. Ni jam konstatis la plenan geografian, ekonomian, gentan, historian kaj eĉ kulturan kaj lingvan diverscon inter ambaŭ landoj. Ekzistas nur geografipolitika dependeco de Egiptujo rilate al Sudano. Pro tiu kaŭzo la egiptoj tiel pasie deziras, ke iu fremdulo ne estru aŭ eĉ kunregu en Sudano kaj tiel reguligu la Nilfluadon. Tial ili tiel obstine kontraŭas ĉiun proponon pri sudanaj sendependeco kaj aŭtonomio, cetere nepravigeblaj pro la malaltnivela kulturŝtato de la sudana loĝantaro. Tial la egiptoj demonstracias, strikas, teroriste atakas anglajn militajn kaj civilajn personojn en Kairo kaj en Aleksandrio.

4.

Ni observis objektivaj kaj senpartie ambaŭ flankojn de la medalo, sur kiu estas engravurita la problemo pri anglaegipta Sudano; unu flanko estas porbrita, la dua poregipta. Sed ĉiu medalo posedas... tri flankojn. Rigardu ni do la trian.

Sur la vastegaj kotonkampoj, lavataj de larmoj kaj ŝvito, laboregas malkleraj, en ĉifonoj vestitaj negroj. Por kelkaj groŝoj por tago ili ŝvitas de frumatena sunleviĝo ĝis vespera sunsubiro. Arabaj gardistoj instigas ilin per vipoj kaj insultkrioj al daŭra laboregado. La "flava febro" forfalĉas multajn vivojn. La taga salajro sufiĉas por ne morti sed ne por laŭbezona ekzistado. En la interarbaraj kampoj, kun vivdangero, ĉasas la negroj sovaĝajn bestojn, por provizi per luksaĵoj la "plumbinsulan" publikon. En interrokaj vilaĝetoj propagandas fanatikaj derviŝoj reziston al la fremdlandanoj. En la fervoj-

stacio de Kartum kaj en la malpura haveno de Port-Sudan, sur la bordo de la Ruĝa maro, formuskolaj negroj, en ŝvito de tropika suno, ŝarĝas pakegojn de kotono, eburo, kostojn de bananoj, daktiloj kaj aliaj ekzotikaj fruktoj kaj ferkestetojn kun oro — sed ricevas nur kuprajn monerojn.

La anglaj negocoj prosperas. Ĉu restis en Sudano komerc-kampo por egiptaj komercistoj? — Jes, restis!

Guste kontraŭ la luksa, el belegaj rozkoloraj ŝtonoj konstruita palaco de la angla landreganto en Kartum, situas la urba bazaro. En ĝiaj mallumaj fumplenaj kafejoj, sur malaltaj el pajlo plektitaj benketoj, sidas dikuloj el Aleksandrio, Kairo, Ismaelia kaj Port-Fuad. Kun altaj ruĝaj fezoj surkape, ili kviete fumadas "nargilojn" kaj palpas perokule la aĉetindaĵojn de la bazaro: en longaj vicoj, unu post la alia, kunkatenitaj, preterpasas sub la vipoj de arabaj gardistoj diversgentaj negroj.

Estas knabinoj de la Mozambika bordo, de la Etiopaj montoj, el la sovaĝejoj de franca Sudano, eĉ el belga Kongo kaj el Kameruno. Ĉiuj tiuj, kiujn la tribestro vendis por fadeno da vitroperloj, kiujn la senrimeda, multinfana patrino transdonis por kelkaj moneroj aŭ la patro por eluzita eŭropa pantalone aŭ kontraŭ elmodiĝinta pafilo. Ĉiuj ili estas kunvenigataj ĉi tie, en la granda sklavinborso de Kartum. La ruzaĵ aĉetintoj provizis sin per laŭleĝe formulitaj "laborfordungaj kontraktoj", subskribitaj de la venditulinoj mem, aŭ de iliaj gepatroj, se ili ne estas sufiĉe plenaĝaj. La kontraktoj validas por 20, 25 kaj por 30 jaroj, kaj ili garantias plenan nepuneblon al la aĉetinto, — "por ke neniu hundo boju"...

Ĉiuj regnestroj scias pri tio, scias diplomatoj, oficistoj, ĵurnalistoj kaj misiistoj de la tuta nigra kontinento kaj de la Meza Oriento. Sed pri tiuj aferoj oni preferas silenti. Ĉar... oni ankoraŭ memoras la pretekston de Mussolini por lia militiro kontraŭ la Etiopa neguso!

Por ĉi tiuj mizeraj sklavinaj Kartum estas nur distribua punkto en ilia longa sufervojo. Ĉi tie la sklavinaj estas muskol-ekzamenataj, dentrigardataj kaj disdividataj laŭ kapabloj: kiuj taŭgas nur por kamlaboroj, kiuj (pli bondukita) por hejma servado, kiuj havas ŝancojn por esti vendotaj al haremo, kaj

kiuj — al la plej aĉaj bordeloj de Port-Fuad, Aleppo, Bagdad, Jaffo kaj Baero. Sed la plej grandan parton forkondukas la egipta negocisto al Port-Sudan. Tie li ŝarĝas ilin sur ŝipetojn kaj venigas ilin al la saŭdian havenon — Ĝeda. Multaj el la mizerulinoj mortas survoje, pro trolaciga piediro, nutromanko kaj malsanoj. Sed la perdo de 20 % de la "ŝarĝo" estas konsiderata kiel laŭnorma kaj estas enkalkulita jam en la prezo. Ĉiumarde okazas en Ĝeda sklavinvendado kaj la Kartuma komercaĵo estas publike ekspoziciata en la bazaro. Por la vendataj kamplaboristinoj la sorto destinas 16—18horan labortagon kun batado kaj nutromanko. Multaj mortfaloj dum la laboro sur la kampoj de Asir, Heĝas kaj Oman. Sed ĝis tiam ili provizos siajn poscedantojn per senpenaj enspezoj kaj per sufiĉaj rimedoj por aĉetkiri anstataŭontajn sklavinonjn. Ne nur la malriĉaj falaĵoj el la malsupra Nilvalo, el Heĝas kaj Jemen aĉetas kamplaboran sklavinon, sed ankaŭ ŝejkoj el Transjordanio kaj efendioj el Irak. Tiuj ĉi postulas por hejma servado "belan" vendatulinon, kies prezo atingas ĝis 100 anglaj funtoj.

La skribanto de ĉi tiuj linioj persone konas en Jerusalemo komerciston, kiu, loĝinte kelkajn jarojn en Kartum, aĉetis tie kelkajn sklavinonjn. Unu el ili, dekjaran knabinon, li poste venigis al Jerusalemo. La sklavinon li edukas kvazaŭ propran filinon. Je demando, kial li kaŭzis al si superflujajn elspezojn, li respondis: "La plenaĝulinojn mi povis liberigi, sed la orfan knabinon estas mia juda devo humane eduki. Aĉeti la sklavinonjn devigis min la tieaj cirkonstancoj: komerciston, kiu ne posedas sklavinonjn, oni tie supozas ne kreditinda."

Sur la Kartuma sklavinbazaro apogiĝas la egipta ekonomisistemo, la feŭda riĉeco kaj potenco de egiptaj paŝaoj: sen la senpaga sklavinna ŝvitlaboro sur la apudnilaj kampoj, ne povus la malriĉa falaĵo pagi al la efendio la koston de la kampluado; la efendio ne povus pagi la tributojn al la paŝao, kaj tiu lasta ne povus ludi la aristokratan rolon de subtenanto de patruja suvereneco kaj savanto de ĝia trono...

Kotono, petrolo kaj sklavinonj; Suezkanalo, Nildigoj kaj sanktoj — jen estas la atutaj kartoĵoj en la malpura politika ludo en tiu mondangulo. La sorto gardu ĝin de falsludantoj!

Pratempaj postvivantoj en Nov-Zelando

De BRENDON CLARK (Nov-Zelando)

El geologia vidpunkto Nov-Zelando estas, malgraŭ sia nomo, inter la plej malnovaj landoj de la mondo. Profundaj maroj apartigas ĝin de Aŭstralio en okcidento, distanco de preskaŭ 1.200 km, de la insularoj norde, ĉ. 1.830 km, kaj de Sudameriko oriente, ĉ. 8.300 km.

La lando do ekzistis jam en la unuaj tagoj de la vivevoluo kaj en tiu malproksima epoko eble estis kunligita kun aliaj landoj. Multaj vivoformoj en Nov-Zelando, precipe plantaj, similas al formoj en Polinezio, Aŭstralio kaj Sudameriko, kaj kredeble iliaj prauloj almigris trans kontinentojn delonge subakviĝintajn. Sed dum la multaj sekvantaj milionoj da jaroj Nov-Zelando restis izolita de la cetera mondo.

El tio sekvis, ke neniam iu indiĝena mambesto loĝis en nia lando. Ĉiuokaze la maorioj, kiuj alvenis unue en la jaro 950, trovis nenium, kaj la britoj, kiuj venis antaŭ 150 jaroj, ankaŭ ne trovis eĉ ostojn aŭ fosiliojn de mambestoj.

Tiu izoleco klarigas la nunan ekziston en nia lando de tiom da pratempaj vivoformoj. Kaj tiu manko de mambestoj klarigas parte la mankon de flugpovo ĉe tiom de ĝiaj birdoj, kies malamikoj troviĝis ne surtere sed supozeble en la akvo, ĉe la bordoj kaj eble en la aero. Tiuj antikvaj kreitaĵoj troviĝis en cirkonstancoj, kiuj havis por ili sufiĉe da nutraĵo, malmulte da malamikoj kaj neniujn ŝanĝiĝojn. Ili bone akordiĝis kun la sensanĝa ĉirkaŭaĵo, kaj tial ankaŭ ili ne ŝanĝiĝis.

La listo de ankoraŭ troveblaj pratempaj vivoformoj estas impona. Sed multaj estas konataj sole de la natursciencistoj, kaj mi volas skribi nur pri tiuj, kiuj estas almenaŭ nome konataj de ĉiu novzelandano: *moa*, *kiwi*, *tuatara* (maoriaj vortoj).

La elfoso de granda krurosto de *moa* (Dinornis moa) donis al prof. Richard Owen, Anglujo, okazon pruvi al la mondo la ĝustecon de tiutempe nova scienco, kompara anatomio. El la informo, kiun donis al li tiu sola ostoj, li priskribis la tutan

birdon. Kiam oni poste trovis kompletan skeleton, montris tiu, ke la konkludoj de la profesoro estis ĉiel ĝustaj.

Moa aŭ dinorno estas nun tute elmortinta, sed ĝi ekzistis multnombro ankoraŭ kiam venis la maorioj ĉi tien, kaj ili ĉasis ĝin por forigi la ĉiaman viandomankon.

Ĝi estis vere giganta membro de la struta familio, kaj ĝia alto estis ĉirkaŭ 4 metrojn aŭ duoble la altecon de altkreska viro. Ĝi estis la sola *tute* senflugila birdo, kiun la mondo ĝis nun konas. Ĝiaj fortikaj kruroj posedis la grandecon kaj la forton de ĉevalaj kruroj. Kvankam la ostoj de aliaj birdoj enhavas acron, por varmo kaj malpezo, tiuj de la dinorno enhavis medolon. Ĝi metis proporcie gigantan ovon, de kiu ekzistas specimenoj, sufiĉe multnombro, en diversaj muzeoj en la mondo.

Per unu bato de la grandega kruro la dinorno povis facile mortigi viron. Malgraŭ sia grandeco kaj forto la birdo tamen ŝajne estis retiriĝema kaj eĉ timema. Alie ĝi ne estus fariĝinta viktimo al la primitivaj armiloj de la maorioj (kvankam kredoble tiuj plej ofte kaptis ĝin per insidoj, en kiuj ili estis iom lertaj).

*

Ni memoras *moan* kun respekto, sed por la ankoraŭ vivanta *kiwi* (*Apteryx*) ni sentas tian amikecon, kian oni sentas por iom stulta sed komika persono, kiu tamen estas bonegulo. Jen estas birdo ne pli granda ol ordinara domkoko, kiu metas ovon trioble pli grandan ol tiu de anaso. Ĝi posedas nek voston nek flugilojn (se oni ignoras la rudimentajn flugilojn, kiuj estas videblaj nur sub la plumaĵo). Sola inter ĉiuj birdoj ĝi havas la naztruojn apud la pinto de la longa beko anstataŭ ĉe la bazo, kaj ĝi posedas kvar ungojn sur la brunaj kaj tre fortikaj kruroj.

Antaŭe la apteriksoj troviĝis multspece en la tuta lando, sed pro alveno de homoj, hundoj, ratoj, musteloj ktp ili iom post iom malaperis. Nun restas nur kvar specoj, troveblaj nur en la plej densaj kaj ncalireblaj partoj de nia indiĝena arbaro. El la mallongaj, harsimilaj plumoj de la apteriksoj la maorioj faris siajn plej alte ŝatatajn robojn. La restaĵon ili manĝis.

Ili logis al si la birdon imitante ĝian longan, altiĝantan fajfadon. Sed inter la plej gravaj malamikoj de la apteriksoj estas la hundoj.

Strukture la apterikso estas la plej ĝeneraligita kaj la plej primitiva el ĉiuj birdoj, kaj hodiaŭ ne ekzistas ia proksima parenco de ĝi. Ĝi konstruas egale primitivan neston el kelkaj bastonetoj aŭ branĉetoj, en trua arbotrunko aŭ sub falinta arbo, kaj tie ĝi metas unu solan ovegion. Tiun elkovas la virbirdo, dum la pli granda apteriksino alportas nutraĵon. La juna apterikso komencas nutri sin kelkajn tagojn post la eloviĝo, kaj de tiam la gepatroj montras por ĝi nenian intereson.

La apterikso manĝas ĉefe insektojn kaj lumbrikojn. Ĝi havas tre fortan flarpovon. Serĉante manĝaĵon (en la krepusko) ĝi brue kaj kontinue flaradas. Per sia longa, kurba kaj blanka beko (kun la naztruoj apud la pinto) ĝi frapetas la grundon, ĝis ĝi trovas lumbriktruon. Tiun ĝi plilarĝigas per rapida tordmovo de la beko kaj eltiras la lumbrikon.

Ĝi estas nokta birdo, kaj eĉ en la propra loko ĝi tre malofte estas videbla dum la tago. Se ĝi estas timigita, ĝi staras longe senmova kaj fidus al siaj bruna kaj grizbruna protektkoloroj. Se tio ne efikas, ĝi povas kuri mallongan distancon treege rapide. Kiam alia besto atakas apterikson, la birdo apogas la dorson al fidinda apogilo, serĉas ekvilibron sur unu kruro, kaj per la alia kruro kaj la tute malfermita beko ĝi batalas furioze. Plurfoje okazis, ke la birdo per siaj fortikaj ungoj senintestigis kaj mortigis eĉ hundon. Strange estas, ke post jarmiloj aŭ eble eĉ jarmilionoj da paca ekzistado la apterikso dum nur kelkaj jarcentoj lernis aŭ rememoris tiel defendi sin.

*

Por *moa* ni sentas respekton kaj por *kiwi* simpatian, sed kion mi diru pri *tuatara*? Sendube nia ĉefa sento estas miro. Ĝi ne estas granda, ĝi ne estas aminda. Sed ĝi nepre estas la plej stranga kaj por la scienculo la plej interesa estaĵo sur la tero.

Ne troviĝas pli antikva tipo de vertebrulo ol *tuatara*. (*Sphenodon punctatus*), kaj ĝi posedas la plej ĝeneraligitan korpo-konstruon ĝis nun konatan. (Kiwi estas la plej ĝeneraligita inter la birdoj, sed *tuatara* inter ĉiuj kreitaĵoj.) Ĝiaj prauloj

ekzistis antaŭ birdoj kaj mambestoj. Ambaŭ tiuj grupoj evoluis el la familio, de kiu la sfenodono estas la sola postvivanto. Kvankam ni nomas ĝin "lacerto", ĝi tiom malsimilas al lacerto, kiom ĝi malsimilas al serpento. Tre prave oni nomas ĝin "vivanta fosilio".

Ĝi havas formon kaj konduton de lacerto, ĝi havas la embrian vintrodormon de testudo. Ĝiaj ripoj multmaniere similas al tiuj de krokodilo, sed sur ili troviĝas elkreskaĵoj kiel sur la ripoj de birdoj.

Ĝi estas 38—50 cm longa. La haŭto estas nestreĉita, ledeca, verdebruna kaj iom skyvama. Spina kresto staras sur la dorso kaj la vosto. Interne ĝi havas bone evoluintan brustoston, tian, kian oni trovas ĉe la birdoj. Estas kaj ventraj kaj brustaj ripoj. La plej interesa interna strukturaĵo estas tamen la tria — ankaŭ nomata pinfruktforma — okulo, kiu troviĝas ĉe la mezo de la kapo. Komprenoble oni ne vidas tiun sur la vivanta besto, sed la ektrovo de tiu tria okulo klarigis la kiecon de similaj sed malpli evoluintaj strukturaĵoj ĉe aliaj vertebruloj ekz. kelonioj, lacertoj, fiŝoj.

Dum la junaĝo kaj plenaĝo la sfenodono havas dentojn en ambaŭ makzeloj, sed poste tiuj foruziĝas, kaj de tiu fakto devenas la nomo *Bekhava lacerto*.

Antaŭe troviĝis la sfenodonoj sur ambaŭ ĉefinsuloj de Nov-Zelando (Norda kaj Suda insuloj). Pro la alveno de eŭropaj kaj aliaj mambestoj ĝi troviĝas nun preskaŭ sole sur la insuletoj apud nia marbordo. Tie ĝi loĝas plej ofte en la kaŝtruoj de iuj specoj de petrelo, kiuj kutime kovas en tiaj lokoj. Pli frue oni supozis nestkomunecon de sfenodonoj kaj petreloj, sed tiun teorion malpravigas tio, ke oni trovis sfenodonojn kun junaj birdoj en la faŭko.

La nesto konsistas el nura kavo, kiun la ino fosis en la sablo, inter konkpecetoj aŭ ŝtonetoj aŭ en torfo. En novembro ĝi motas dek ĝis dek kvin ovojn. Tiuj estas 3—4 cm longaj kaj estas blankaj, kun forta sed iom fleksebla ŝelo. La birdoj kovras ilin per herboj aŭ folioj. Sekiĝo signifas katastrofon. La embrio disvolviĝas dum tri aŭ kvar monatoj. Poste ĝi dormas tra la vintro kaj eloviĝas en decembro aŭ januaro (nia somero).

La sfenodonoj dormas dum la tago sed multe plivigliĝas je krepuskiĝo. Krom birdetojn ili manĝas helikojn, limakojn, insektojn kaj arancojn. Precipe ili ŝatas helikojn kaj limakojn, kiuj ankaŭ estas pli abundaj dum la noktoj.

Ili amas bani sin kaj restas senmove kaj duone subakve horojn post horoj. Kiam ĉasataj ili levas la korpon de la grundo kaj kuras per ŝanceliĝa sed rapida movo tri aŭ kvar metrojn. Tiu ekvigliĝo tamen ŝajne tiom eluzas ilin energion, ke ili ne povas tuj refari tian agon.

Dum la daŭro de jarmilionoj ili restis senŝanĝe en trankvila izoleco, kaj iliaj korpopartoj montras la vojon, kiun sekvis la cetera vivo de la plej fruaj epokoj.

Debato

Pri "La fundamento de la vivo"

La religiema homo nomas la skeptikulon "ateisto", "homo sen Dio", tute senrezono, ĉar plej ofte la "sendiulo" estas tiom religiema kiom la ekleziano, aŭ pli, sed li ne emas akcepti tradicion, t. e. la opiniojn de antaŭuloj kaj prauloj kiel Dian devenaĵon, kiam ĝi ne akordiĝas kun la eltrovoj de la scienco, t. e. kun la spertoj de la homaro dum la jarcentoj post la revelacio de religio. Anstataŭ sekvi la respektindan tradicion li emas rilate al metafiziko koncepti siajn proprajn pensojn. Sed malgraŭ tio li ne estas ateisto, li same kiel iu religia homo serĉas sian Dion.

La agnostikulo ne kredas, ke homa cerbo estas kapabla koncepti idcon pri metafiziko, pri la "transo", pri kiu liaj sensoj ne povas alporti iun ajn ateston. Li ne neas revelaciantan religion, io ajn ja estas ebla, sed ekzistas aliaj eblecoj, tute ne koncepteblaj. Li konsentas pri la ekzisto de Supra Estaĵo sed ne arogas al si la rajton imagi tiun estaĵon laŭ sia propra bildo. La religioj fonditaj sur la hebrea biblio imagas antropomorfan Dion, kun homaj kvalitoj kaj homecaj difektoj. Por esti per-

fekta Dio ne povas esti ĵaluza, punema, kolerema, kia ofte montriĝas Jehovo. Eĉ la Dio Amo de la evangelioj estas antropomorfa Dio, la patro de sia familio, la paŝtisto de sia grego, la reĝo de sia popolo.

Sed la universo estas tre granda kaj tre kompleksa. Tiu ĉi planedo, tiu ĉi polvo kun sia tuta vivo, kiu ja estas nur ŝimo sur ĝia surfaco kaj de kiu la homaro estas nur sensignifa parto, tiu ĉi tero, mi volas diri, estas tro "nenio" por rajti postuli sian Dion. La Dio de la universo ne povas posedi homsimilajn kvalitojn sed devas esti al ni tute nekonceptebla estaĵo.

Eble la tuta universo konsistas el la spirito, kiun oni iam nomis la "etero", kaj ĝi formis el si la materion, la praelktronon, kiu fariĝis la praatomo kaj formis la pranubulozojn, stelojn, sunojn kun iliaj planedoj kaj satelitoj kaj sur kelkaj el ili kun tio, kion ni nomas vivo. Eble Dio estas tiu tuta spirita universo, ampleksante la materion kaj ankaŭ min? Tio estas nur revado, mi ne kuraĝas diri, ke estas penso.

Tiel ankaŭ la agnostikulo kredas je la senmorteco ne nur de la homa animo, ne nur de ĉio viva sed de la materio ĝenerale, ĉar ĝi estas ja emano de la spirito. Sed li ne kredas, ke la senmorteco estas rekompenco por brava konduto, ke ĝi povas esti influata de bona aŭ malbona konduto, ĉar absoluta bono aŭ malbono ne ekzistas.

La agnostikulo tamen akceptas homan moralon. Li kredas, ke la homaro troviĝas en evoluo kaj ke homa bono estas ĉio, kio helpas la evoluon en dezirinda direkto, malbono estas ĉio, kio malhelpas ĝin. La bazo de juda, kristana kaj islama moralo estas ja la sama.

La eklezio riproĉas la sendiulon pro tio, ke li rifuzas kredi je Dia revelacio, tamen kredeme akceptas nepruveblajn sciencajn teoriojn, ekzemple la teorion de evoluo de la homaro el bestsimilaj antaŭuloj. Certe ni ne ĉeestis ĉe la estiĝo de la mondo, nek de la homaro, sed ni posedas abundajn atestojn, kiuj permesas al ni formi opinionon.

Ĉu estas trovobla komuna tereno por du pensdirektoj tiel diversaj? Eble — se ne sur bazo racia aŭ naturleĝa certe sur moraleĝa. La fundamentaj moraleĝoj estas ja akceptitaj kaj pli malpli obeataj de la tuta homaro (ni esceptu devojligojn,

ekz. hitlerismon kaj aliajn). Ni kredu je Dia amo savonta la homaron aŭ je amo sen religiaj dogmoj, ambaŭokaze nia kredo estas la necesa bazo por homa evoluo al la nekonata celo.

Mi estas certa, ke mia koramiko, viro tre religicma, ne rifuzos al mi sian manpremon post legado de tiuj ĉi linioj.

Ernst Lunzer, Aleksandrio, 26.8.1947.

*

Por la debato pri "La fundamento de la vivo" povas esti valoraj la sekvantaj vortoj de prof. Radakrishnan, la plej eminenta hinda religifilozofo de la nuntempo. (El *An Idealist View of Life* — *Idealista vivkoncepto* — George Allen & Unwin LTD, 1929).

"Ni ege pligrandigis nian sciencan scion pri la mondo kaj la homa naturo, sed malmulte pravigas la pretendon, ke ni scias pli multe pri la sekretoj de la homa animo ol faris antaŭ jarcentoj niaj avoj. En la regno de spirito nia nescio ŝajnas same profundega kiel ilia. Estas stulta memkontento fermi sin for de vera scio, kiu troviĝas en la grandaj literaturoj, filozofioj kaj religioj de la mondo, kiuj havas en si multe, kio estas ege grava por nia vivo. Ili estas eble pli gravaj ol ĉiuj aliaj atingoj de la homa spirito, inkluzive psikanalizon, ĉar ili rakontas al ni pri la evoluo de la spirito kaj insistas pri pli profunda tuteco de ekzisto, kiu sola povas doni la ĝustan percepton pri la signifo de la ekzistaĵoj...

Kodoj, kiuj inventas virtojn, kiuj estas sterilaj, kaj pekojn, kiuj estas imagaj, apartigas nin de la saniga moviĝo de la vivo, kaj vera religio havas nenion komune kun tia spirito de neado.

Scienco kaj kritiko diras nenion kontraŭ religio, kiu proklamas nematerian spiritan eklezion, kiu estas frataro de homoj kun bona volo, eklezion, kiu trovas nenion malaminda krom hipokrito, nenion malmorala krom kormalmoleco. Sed religio, kia ĝi nun estas praktikata, devas iri longan vojon antaŭ ol ĝi atingos tiun celon. — — — Scienco, kiu okupiĝas pri eltroveblaj faktoj, kaj religio, kiu ekscesas en nepruveblaj hipotezoj, fariĝas opoziciaj unu al alia. — — — Lojaleco al ni mem, al niaj intelekto kaj konscienco postulas ke ni ne konsentu al asertoj, kiuj ne volas subiĝi al niaj konscienco kaj prijuĝo.

Ni fariĝas pli religiaj proporcie al nia pretenco al dubo sed ne laŭ tiu al kredo. Ni devas respekti nian propran dignon kiel raciaj estaĵoj kaj tiel malgrandigi la forton de trompo. Estas pli bone esti libera ol esti sklavo, pli bone seĝi ol esti nescianta. Racio helpas nin forĵeti tion, kio estas false instruata kaj kredata pri Dio, ke li estas esplora oficisto aŭ kaprica despoto aŭ glora instruisto. Estas grave, ke ni submetas niajn religiajn kredojn al la ekzameno de racio. — — — Adoro kaj medito, preĝo kaj sindono estas agoj, en kiuj la animo en sia tuteco estas en ekzerco, ne nur menso kaj korpo. Ni adoras ne per menso aŭ korpo sed en spirito kaj vero. Nia menso komprenas, nia korpo partoprenas, sed adoro iras trans tiujn. Ĝi estas la kunigo de la homa spirito kun la spirito de la universo — — —

*

La nova Testamento (estiĝo)

La libroj de N. T. iom post iom akiris la nunan tekston. La origina teksto grandparte perdiĝis pro tre multaj ŝanĝoj. Se oni komparas la konservitajn manuskriptojn unu kun la alia, oni vidas, ke diversaj prilaborintoj plurfoje ŝanĝis la tekston per aldonoj, forigoj kaj aligoj.

La plej malnovaj ekzempleroj, skribitaj sur papiruso, ne plu ekzistas.

La plej malnovaj konservitaj ekzempleroj, sur pergameno, datiĝas de la kvara jarcento. De la greklingvaj N. T.-oj oni konas 2.500 manuskriptojn, kiuj tiom diferencas, ke oni atingas la nombron de 200.000 malsamaj interpretoj.

Jam pro tio montriĝas nefidindeco.

La evangelio laŭ Luko (ne *de* Luko) diras, ke cirkulis multaj priskriboj pri "Jesuo". Efektive en la komencaj jarcentoj aperis torento da "kristanaj" skriboj: diversaj evangelioj, agoj, espistoloj (leteroj), apokalipsoj — ĉiuj malsamaj koncerne prezenton kaj enhavon.

Oni do komprenas la demandon de multaj ekleziaj gvidantoj tiutempe: Al kio ni konformiĝu? Kio validas kiel vero?

La opinioj tre diferencis. Kion unu akceptis, tion alia forĵetis.

Origines (185—254) deklaris i. a.: "Estas nuntempe fakto, ke la malsameco de la ekzempleroj estas granda, ĉu pro senzorgeco de kelkaj kopiintoj, ĉu pro la impertinento de kelkaj, kiuj krime "plibonigis" la skribaĵon, ĉu pro tiuj, kiuj ordigante aldonis aŭ forigis laŭplaĉe."

Kaj en la kvara jarcento skribis *Hieronymus* (la aŭtoro de la latina biblio, Vulgata) i. a.: "Tre disvastiĝis en niaj manuskriptoj la eraro..."

La eklezio de Romo, fariĝinte potenca, decidis fini la ĝeneralan konfuzon kaj malordon por akiri unu eklezion kun unu doktrino ("la sola beatiga eklezio"). Post diversaj bruaĵoj koncilioj (episkopaj kunvenoj) de 325 ĝis la 5a jarcento oni apartigis serion, kiu validas kiel kanono (eklezia regulo) por kredo kaj disciplino: la kanonaj libroj de N. T. (denove difinita en la tempo de la reformacio).

Pli detale:

"Hebreoj", "Jakobo", "Judas" kaj precipe "Apokalipso" ĉiufoje sportis obstinan kontraŭstaron. Komence N. T. estis multe pli ampleksa kaj enhavis i. a. leteron de Barabas, du leterojn de Klemens al la korintanoj, la Paŝtiston de Hermas, eĉ la Psalmojn de Salomono.

Iom antaŭ la jaro 200 la eklezioj egipta, malgrandazia kaj nordafrika kunvenis kaj decidis, ke N. T. konsistu el: 4 evangelioj, Agoj de la apostoloj, 13 leteroj de Paŭlo, 1 letero de Petro, 1 letero de Johano kaj la Apokalipso. Do ne: Hebreoj, Judas ktp. En 325 en Nicco (Malgranda Azio) oni akceptis la nunan kolekton. Kvin jarojn poste en Laodicea (nun Eski-Hissar, Malgr. Azio) oni denove malakceptis la Apokalipson. En 393 en Hippon (Numidio) ĝi tamen estis reakceptata.

La elekto de la skribaĵoj okazis laŭ la konsidero: Kio povos servi al la valida doktrino, kaj kio malutilos al ĝi (Celo: por ke vi kedu, ke Jesuo estas Kristo. Joh. 20:31).

Oni baziĝis ĉefe sur hebre- kaj greklingvaj tekstoj; sed la trovitaj manuskriptoj estas skribitaj en pli moderna lingvaĵo, tiel ke la hebrea lingvo de la manuskriptoj ne plu estas la origina. La plej malnova hebrea manuskripto datiĝas de la

9a jarcento, kaj la kopioj igis jam Spinoza¹⁾ kritiki en "Politik-teologia traktato".

La plej malnova greka manuskripto de N. T. datiĝas de la kvara jarcento: ĝi enhavas ankaŭ apokrifajn (nekanonajn) librojn.

Grava estas nun la demando:

Ĉu tiuj N. T.-libroj estas "dia vorto", produktoj de iu neraripova, inspiranta Parakleto (sankta spirito)? Ĉu ili estas kredindaj? La "vorto dia" mem donas al ni respondon. Ne ekzistas libraro kun tiom da kontraŭaĵoj, eraroj, neveroj, kiom la biblio enhavas. Mi kolektis abundon da ekzemploj por tion pruvi.

Krome montriĝis, ke N. T. enhavas preskaŭ ne unu bildon, vorton, tekston, kiu ne troviĝas en iu aŭ alia antaŭkristana religio kaj filozofio. Ni disponas abundon da ekzemploj por pruvi ankaŭ tion.

Kritiko legi la biblion estas saniga rimedo kontraŭ superstiĉo.

B. Rijpstra.

La kanto de Islando - kaj de Suomi

De VILHO SETÄLÄ

Okaze venas en mian manon verketo, aperinta jam antaŭ 17 jaroj, "Islando, lando, vivo, literaturo" de Olafur Th. Kristjánsson. Kaj tuj post la tabelo de enhavo mi legas tie la Islandan kanton:

La Islanda Kanto

De Grimur Thomsen. 1820—1896.

Aŭdu la ŝpruc-fontojn varmajn,
aŭdu cignajn kantojn ĉarmajn:
jen l' islanda kant';
aŭ riverojn fort-fluantajn
aŭ kaskadojn faladantajn:
jen l' islanda kant'.

¹⁾ Baruli Spinoza, monisma deterministo (1632—1677).

Aŭ l' insulan bird-kantadon
kaj la kavan resonadon:
jen l' islanda kant'.
Aŭdu tondron de l' ondego
aŭ la muĝon de l' ventego:
jen l' islanda kant'.

Ĉiam en animo via
vivas ankaŭ kanto tia
— la islanda kant'.

Kaj en via propra koro
en la ĝojo kaj doloro
sonas tiu kant'.

Tradukita de Sig. Kr. Pétursson.

Finna leganto tuj aŭdas en siaj oreloj la Kanton de Suomi, kiun ni redonas en la majstra traduko de "nia iama ambasadoro"¹⁾ prof. dro G. J. Ramstedt:

Kanto de Suomi

De Emil von Qvanten.

Aŭdu, sorĉe kanto sonas,
muskaj montoj vortojn donas:
jen la Suomi kant'.
Aŭdu, zumas floraj valoj,
bruas pinoj, akvofaloj:
jen la Suomi kant'.

Vidu, nokte en la Nordo
brilas suno sur vidbordo:
jen la Suomi kant'.
Kaj en vintro la ĉielo
fulmas en nordluma helo:
jen la Suomi kant'.

Ĉie ĉio sonas kante,
alvokante, allogante:
jen la Suomi kant'.
Frato, se vi koron havas,
kiun la beleco ravas,
jen la Suomi kant'.

¹⁾ Profesoro Ramstedt estis sialtempe reprezentanto de Finnlando ĉe la Japana registaro, kaj tie li multe subtenis la propagandon de esperanto.

Aliparte, mi ne povas forgesi tion, ke en sia pli frua traduko sinjorino Hilma Hall finas la kanton de Suomi — kompreneble nur pro kaprico de la sorto — laŭvorte same kiel Sig. Kr. Pétersson sian tradukon de la Islanda:

Kaj en via propra koro
en la ĝojo kaj doloro
sonas Suomi-kant'!

Estas ja neniam dubo pri tio, ke la kantoj Islanda kaj Finnlanda ne povas esti sendependaj kreaĵoj. Estas nur la demando pri tio, kiu el ili estis la pli frua, kiu inspiris la alian al simila laŭdo de sia lando? En Finnlando, ŝajnas al mi, oni neniam scias pri la afero inter la literaturhistoriistoj.

Pri la kanto de Suomi ni scias, ke la gazeto Helsingfors Morgonblad (Matena gazeto de Helsinko) aperigis en la jaro 1844 la "Kanton de Suomi" (Suomis säng), verkitan de tiam nur 17-jara poeto Emil von Qvanten, en sveda lingvo. Ni devas noti, ke tiatempe la finnlingva literaturo estis ankoraŭ en siaj vindaĵoj, se oni ne kalkulas la popolan poezion miljare konservitan en la memoro de la bardoj, el kiu estis ĵus kompilita kaj publikigita Kalevala. Tial ne estas mirinde, ke finna nacia sento aperis en vestaĵo de sveda lingvo. La kanto baldaŭ fariĝis — kaj precipe ankaŭ en finnlingva traduko — unu el la plej ŝatataj patriotaj kantoj, kaj estas tia ankoraŭ en la hodiaŭa tago.

Emil von Qvanten vivis de 1827 ĝis 1903. Li eldonis sian unuan kolekton da poemoj, "Dikter", en 1851, kies dua, pliigita eldono "Lyriska dikter" (Lirikaj poemoj) aperis en 1859. Pro pulmomasano li faris longan vojaĝon ĉirkaŭ Afriko ĝis Hindio, de kie li revenis kaj ekloĝis en Svedlando. Tie li verkadis politikajn artikolojn pri reunigo de Finnlando kun Svedlando, kaj tial ne povis reveni al sia patrujo. Li eldonis ankoraŭ novajn kolektojn da poemoj en 1880 kaj 1900. Krom tio li agis kiel kritikisto literatura, teatra kaj muzika.

Pri Grímur Thomsen ni legas en "Islando", ke li vivis inter 1820 kaj 1896. "Li servis iam inter la dana ambasadoraro, sed dum la tri lastaj jardekoj de sia vivo li bienis en sia patrujo.

Liaj poemoj staras sur nacia bazo kaj temas ofte pri historiaj homoj kaj heroaĵoj. La eksteraĵo foje estas sufiĉe kruda, sed oni tion pardonas pro la valora enhavo kaj la potencoplena stilo."

Sed tio ne solvas nian problemon. Kion do faras esperantisto? Mi skribas al instruisto Olafur Th. Kristjánsson en Hafnarfjörður. Kaj post paso de ĉ. du monatoj — la poŝto estas malrapida, ne samideano Kristjánsson, kiu jam post du tagoj respondas — mi havas lian leteron, kies ĉefajn partojn legu ĉi tie:

Pri la vivo de la poeto Grímur Thomsen mi povas diri, ke li naskiĝis la 15an de Majo 1820, en Bessastadhir, bieno proksime al Reykjavík. Lia patro estis oraĵisto kaj ekonomia intendanto ĉe la gimnazio, kiu tiam havis sian hejmon en Bessastadhir. Li ankaŭ estis membro de la du unuaj parlamentoj post ĝia revivigo 1844. La patrino de Grímur estis fratino de la tiama provincestro (amtmadhur) en la norda parto de Islando, Grímur Jónsson, kies nomon la poeto portis. Grímur faris studentan ekzamenon en 1837. Ĉe la universitato en Kopenhago li studis, unue juron, sed poste filozofion kaj literaturon. En 1845 li akiris gradon de magistro per traktaĵo pri la angla poeto Byron, sed laŭ ordona deklaro de la registaro dana en 1854 la magistra grado de tiu tempo egalvaloras al doktora grado de posta tempo. Thomsen ricevis stipendion por vojaĝi tra Italujo, Francujo kaj Anglujo. Poste li servis kiel oficisto ĉe dana registaro, unue kiel asistanto de la dana ambasadoro en Brüssel kaj Londono, sed poste kiel departementa ĉefo en Kopenhago. Li ekloĝis en 1867 kaj transloĝiĝis al sia patrujo, kie li aĉetis la bienon Bessastadhir, kaj tie li loĝis ĝis mortotago, la 27an de novembro 1896. Li estis membro de la islanda parlamento 1869—1891.

Grímur Thomsen skribis multajn kaj diverstemajn artikolojn kaj traktaĵojn en danaj gazetoj, kiel ankaŭ en islandaj. Li eldonis malgrandan libron poezian en 1880, kaj alian pli grandan en 1895. Thomsen estas rigardata kiel unu el la plej eminentaj poetoj islandaj. Ofte li verkis poemojn pri temoj historiaj, mallongajn, klarajn, plenajn de nacieca sento. La literatura profesoro Sig. Nordal diras pri li: "Grímur estis multlerninto kaj granda mond-civitano, sed en siaj poemoj li estas forte

islanda. Oni povus diri, ke la longa restado eksterlande purigis lin, ĝis nur la plej malfalsa metalo de islanda lingvo kaj naturo de la nacio postrestis."

La poemo "Islanda kanto", kiu en la Poemlibro de 1880 nomiĝas "Landslag" (Aspekto de la lando, Pejzaĝo), troviĝas en multaj kantlibroj kaj legolibroj ktp. La esperanta traduko estas presita en "Kennslubók í Esperantó" (Lernolibro de Esperanto) de la nuna statistikeja direktoro Thorsteinn Thorsteinson. Kiam Thomsen verkis la poemon, neniu scias, sed ĝi aperis unue en kantkolekto 1875. En la eldono de 1880 (kiel ankaŭ la nova tuteldono de 1934) staras sub la titolo: "(Suomis sǎng: Hör hur härligt sǎngen skallar)". La finna poemo klare donis la ideon al la islanda poeto. Pri tio diras doktoro Jón Thorkelsson en memoriga biografio, kiun li skribis en iu islanda periodaĵo post morto de Grímur Thomsen: "Li ne volis esti 'dua eldono' de aliaj homoj. Li volis esti mem la originala eldono. Lia ekkono de literaturo de aliaj nacioj apenaŭ povis sur li efiki alimaniere ol gvidi lian guston en komenco kaj fekundigi lian animon. Ankaŭ atestas pri tio multaj el liaj tradukaĵoj el aliaj lingvoj. Li ŝanĝis ilin, forviŝis ĉion fremdan kaj donis al ili tian islandecon, ke la poemoj en lia traduko estas pli similaj al li mem ol al la originala aŭtoro, eĉ tiel, ke li povis kelkfoje kun egala rajto marki ilin per sia marko. Tiel estas pri tri poemoj en la Ljóðhmaeli (Poemaro) de 1880, pri kiuj liaj malamikoj kulpigis lin — inter ili Landslag — kaj tie montras Grímur inter parentezoj ke 'Suomis sǎng' (finna nacia kanto: Hör hur härligt sǎngen skallar) estis lia modelo, sed Landslag estas tiel islanda en la prilaboro de Grímur, ke ĝi estas preskaŭ originala."

Proza traduko de "Islanda kanto"

Aŭdu bruladi en serena spruĉ-fonto (gejsiro),
aŭdu eĝnojn kantantaj ĉe maro:
Tio estas kanto (aŭ: melodio) de Islando.
Aŭdu riveron sur kaskad-ŝtonoj muĝi,
akvofalon en rokaj fendegoj rapidi:
Tio estas kanto de Islando.

Aŭ birdon en insuloj kanteti,
plat-rokoj kaj kavoj resonadas:
tio estas kanto de Islando.
Aŭdu bord-ondegaron ĉe marrokegoj bruegi,
atakojn de fortaĵ neĝoblovoj rapidkuri:
Tio estas kanto de Islando.

Kaj en via propra brusto ligitaj
dormetas voĉoj de la naturo:
La propra kanto de Islando.
Pej interne en via propra brusto,
kiel en ĝojo tiel en doloro,
sonas la kanto de Islando.

La naturaspekto en la poemo estas tute islanda.

La melodio ordinare uzata estas tiu de Pacius. En Söngbók stúdentá (Studenta kantlibro) de 1934, — tekstlibro, — la 9-a kanto estas: "Heyridh vella á heidhum hverri" de Grímur Thomsen, melodio: finna nacia melodio. La 26-a kanto en la sama libro estas "Hör, hur härligt sǎngen skallar" de E. von Qvanten, Melodio de Pacius. Citata estas en ambaŭ lokoj la sama numero de melodio en certa melodika kolekto-libro. Iu islanda komponisto faris melodion al la poemo, sed ĝi ne estas multe uzata.

La leganto permesu al la verkanto ankoraŭ unu supozon. Ŝajnas al mi, ke samideano Olafur dismetas la vorton 'Landslag' jene: 'Land-slag', kaj tial tradukas ĝin 'aspekto de la lando'. Sed ĉu ne estas alia (pli proksima?) analizo: 'Lands-lag' kun senco 'kanto de la lando'? Kompare al 'Islands lag' = 'Islanda kanto' tio ŝajnus al mi, sen kono de la islanda lingvo, pli probable. Aŭ ĉu tie kaŝas sin vortludo?

Tiel solviĝis nia problemo, sen kono de la islanda lingvo. Kaj ree pruviĝis, ke la scio de esperanto estas granda privilegio.

La Dieco

De GOETHE

Nobla estu la homo,
helpema kaj bona!
Ĉar sole tio
distingas lin
de l' kreitaĵoj,
kiujn ni konas.

Gloron al la transaj
superaĵoj,
enkore sentataj!
Lin simulu la homo;
Instruu nin lia ekzemplo
je ili krom.

Ĉar sensenta
estas la naturo:
lumadas la suno
super ni ĉiuj,
kaj al krimulo
kaj al bonulo
brilas luno kaj steloj.

Ventoj, torentoj,
tondro kaj hajlo
bruadas kaj muĝas,
blinde ekkaptas
kaj blinde detruas.

Ankaŭ fortuno
agadas hazarde,
jen kaptas knabon,
senkulpan infanon,
jen kulpoplanan
homon grizharan.

Laŭ leĝoj grandlozaj,
feraj, eternaj
ni ĉiuj devas
plenumi la cirklon
de nia vivado.

Sole la homo
kapablas la neeban;
nur li distingas,
elektas kaj juĝas
kaj povas haltigi
rapidan momenton.

Sole li rajtas
rekompenci bonulon
kaj puni malbonulon,
kuraci kaj savi,
erarantan, sencelan
utile kunligi.

Kaj ni adoras
la diajn estaĵojn,
kvazaŭ estus ili homoj
kaj farus grandskale,
kion ni ĉiuj
volas aŭ faras malgrande.

La nobla homo
estu helpema kaj bona!
Senlace li kreu
utilon kaj bonon,
per sia vivo prezentu
la korsentatajn estaĵojn!
Tradukis Karl Jost.

Literaturo

Theo Thijssen: La nevenkebla ĝeno.
Tradukis F. Faulhaber.
Eldonis Libroservo FLE, Amsterdam.
Prezo fl. 4.90.

La libro havas subtitolon: Momentoj de tualeta mizero. La du titoloj kune povas vekti imagon pri humoraĵo en la stilo de Mark Twain. Multe da humoro troviĝas en ĝi, sed la verko esence estas alispeca. La aŭtoro ekhavis la bonan kaj, laŭ mia scio, vere originalan ideon verki rakontoforman libron pri homo kaj liaj vestoj.

La rakonto estas en mi-formo kaj komenciĝas, kiam la eta heroo havas kontentige da memkonscio por trovi, ke ŝuoj, kiujn li devas porti, tute ne konvenas al li, ke estas honto al li porti ilin. Poste sekvas epizodo post epizodo el lia vivo, ĉiu kun vestoj kiel ĉeftemo, ĝis li estas matura viro kun propraj infanoj. Ĉiu epizodo estas aparta, sufiĉe memstara ĉapitro, tamen multrilate ligita al la tuto. La ĉefpersono havas gefratojn, gepatrojn, parencojn, kaj multaj, multaj aliaj personoj partoprenas la agadon, estas vigla kaj multhoma nederlanda vivo. En ĉiu epizodo estas multe da drameco.

La ĉefa afero en la rakonto estas psikologia: estas priskribo kiel homido, rigardante sin kiel centron de la mondo sed samtempe ege influata kaj formata de sia medio, reagis kaj konduktas rilate al siaj vestoj. Kaj la frazo kaj la afero mem povas ŝajni ridindaj. Efektive la temo tamen havas kaj profundon kaj vaston. En malmultaj aliaj rilatoj la homa animo tiom senkaŝe montras sin. La aŭtoro estis instruisto kaj multaj detaloj estas valoraj sugestoj al gepatroj kaj aliaj edukantoj. Cetere ni renkontas ankaŭ sociajn kaj aliajn perspektivojn.

El arta vidpunkto la libro ŝajnas al mi tro larĝe rakontita, kun multe pli da eksteraĵo ol kiom estas necesa por esprimi tion, kion la aŭtoro volas esprimi. Homoj, kiuj unuoloke ŝatas vigan rakontadon, verŝajne tamen ne bedaŭras tiun abundon da kvanto.

Al legemaj kaj lernemaj esperantistoj la libro estas tre rekomendinda: amaso da interesaj kaj agrablaj rakontoj en esperanta lingvo, kiu estas pli ol ordinare flua, viva kaj "natura". Kelkajn punktetojn korektindajn aŭ diskutindajn mi trovis, sed ili malmulte gravas rilate al la tuto.

*

G. J. Degenkamp, Esperanto 60-jara.
Eldonis Libroservo FLE, Amsterdam.
Prezo broŝ. fl. 1,30, kart. fl. 1,75.

Libroservo FLE solenas la 60-jaran ekziston de esperanto per la supre nomita volumo, en kiu Degenkamp skizas la evoluon de la literatura lingvo. Tion li faras en dekkvin nelongaj sed enhavoriĉaj ĉapitroj. Krome troviĝas enkonduka ĉapitro kaj du specimenoj de prozaj tekstoj. La unua el tiuj lastaj estas la novelo "La neĝa blovado" de Puŝkin, tradukita de Grabowski en la unua jaro de esperanto, kiam ekzistis nur la vortlisto kun ĉ. 900 vortradikoj. La dua estas eltiraĵo el plej modernstila prozaĵo, la traduko de Ivo Rotkviĉ de "Cezaro". La libro donas al pli malpli novaj aŭ literature nespertaj esperantistoj ne kompletan sed koncizan kaj valoran superrigardon pri la literaturlingva evoluo. Ofte la verkinto tuŝas punktojn, kiuj nepre interesas ankaŭ spertan esperantiston.

*

Tri majstroneveloj.
El la germana tradukis E. Pebe.
Eldonis "Tramondo", Vieno.
Prezo aŭstr. ŝil 5.50.

32paĝa kajero kun unu novelo de Heinrich von Kleist kaj unu de Theodor Storm. La tria majstronovelo estas fragmento el novelo de Adalbert Stifter, kunprenita ŝajne por plenigi la lastajn paĝojn de la dua presfolio. Lingvo iom peza, parte kompreneble pro la germanaj originaloj, parte pro ne necesa uzo de afiksoj kaj pezaj esprimformoj. Efektivaj eraroj troviĝas sed estas malmultaj. — La valoro de tia eldonaĵo ŝajnas al mi, el esperanta kaj eldona vidpunktoj, iom duba. Tamen — la eldonejo certe faras tiom, kiom permesas la nunaj cirkonstancoj. La du noveloj kompreneble estas legindaj. Aĉetante la

libreton vi donos al la aŭstriaĵ samideanoj iom da eksterlanda valuto, helpos al ili havigi alilandan literaturon, helpos al evoluo.

*

Agostinho da Silva: Historio de Usono.
El la portugala trad. Manuel de Freitas.
Eldonis Portugala Eldona Rondo.
Prezo 2 rpk.

Nova, leginda kajereto en la serio "Enkonduko en la kulturon". La lingvo estas taŭga.

*

Frank Booth: Arboj de la arbaro kaj kampo.
Eldonis The Esperanto Publishing Co.
Prezo 1 ŝ. 9 p. + afr. 1 p., aŭ 7 rpk.

Estas malgranda, tipografie bela libro, kiu laŭ la antaŭparolo turnas sin precipe al "kamparamantaj kaj tend-loĝemaj gejunuloj, por kiuj la originalo efektive estas verkita". (La libreto estas traduko el la angla.) La aŭtoro rakontas pri naŭ foliarboj: interesajn ĝeneralajn aferojn, ĉion pri la eksteraĵo de la arboj, fruktoj ktp. Estas belaj ilustraĵoj pri la arboj mem kaj folioj, burĝonoj, fruktoj. Ŝajnas al mi, ke kelkaj el la arbo-desegnaĵoj povus esti pli karakterizaj.

La libro do celas konatigi tiujn arbojn kaj iliajn belecon al gejunuloj — kaj volonte ankaŭ al aliaj — kaj vekti amon al tiu speciala parto de la naturo. Aĉetu ĝin! Tion ĝi meritas. Se vi jam konas tion, kion ĝi prezentas, vi povas donace per ĝi malfermi al iu alia la belecon de la arbomondo.

Amanto de arboj kaj arbaroj trovas en la naturo same multe da belo kiel en arta galerio — kvankam alispecan. Li proksimiĝas al la vivmistero kaj la universala vivo, trovas pacon kaj harmonion. Diris iu aŭtoro, mi momente forgesis kiu, paradokse sed ne sence, ke la plej simpatiaj vivaj estaĵoj estas la arboj.

Anglujo verŝajne havas pli da arbamantoj ol iu alia okcidenta lando. Post tiu malgranda specimeno niaj anglaj samideanoj espereble povos iam doni al ni multe pli ampleksan libron pri la sama temo. Per tio ili utilis multlande al naturprotekto kaj sento por natura beleco.

*

Literatura Mondo. Aperis la duobla nro 7—8. Ĝi enhavas novelojn de Baghy, Gorbatoŭ, Stockton, poemoj de Kalocsay, Tárkony, Vančík, krome ĵurnalraporton el Palestino, recenzojn, observojn. Majstra, interesokapta kaj ĝuiga estas la lingva dialogo de Kalocsay pri *La problemo de "Po"*. Mi iom hezitas pri lia lasta kazo kun "po": Mi donis al la infanoj po unu pomojn. Se mi ne miskomprenas, la senco estas: Mi donis al la infanoj pomojn, po unu (pomon). "Po" rilatas sole al la numeralo, sed ĉu "unu" ne rilatas al substantivo, dirita aŭ subkomprenita? Laŭ la donita ekzemplo, mi diru: La infanoj kunportis po unu kronojn, ni pagos po unu kronojn. Mi ne trovas tiun formon preferinda.

Malgranda Revuo

finas per tiu ĉi numero sian kvinan jaron. Ĝi ne estis sukcesa. De la antaŭaj tri numeroj estas venditaĵoj po 300—350 ekz., restas ĉe mi 200—250.

Amikoj, ĉu vi povas helpi al mi trovi aĉetantojn por almenaŭ parton de tiu resto? La enhavo de la kajeroj certe ne perdis ion de sia valoro.

Venos nova jaro. Ne forgesu renovigu vian abonon, se ĝi finiĝis! Rekomendu la revuon al viaj amikoj, igu ilin abonitaj!

Mi kore dankas pro via ĝisnuna helpo kaj intereso kaj esperas, ke ni povos en la venonta jaro atingi pli bonan rezulton.

La redaktoro.

Korekto

Bedaŭrinda elfalo de verslinio okazis en la pasinta numero. Afable enmetu sur paĝo 23, inter la kvinan kaj la seĉsan liniojn de la lasta strofo de *Terpomoj*, la sekvantan linion:

Stop! Nu, kial vi ne tuj rapidas?

Paĝo 17, lin. 5 de mals.: 1495 — devas esti 1485.
